



LIBERPENSULA ANGULO

Ni celas aperigi sub tiu titolo ekstraktojn, por ke ĉiu povu ekkoni, almenaŭ fragmente, la verkojn de racionalistaj verkistoj. Ni honoru unue Han Riner, kun „La Pacemuloj” *):

(Francaj ŝiprompiĝuloj estas komplete akceptitaj de la „pacemuloj”, sovaĝa” popolo kun supera civilizacio, loĝanta en la fantazia kontinento Atlantido. Ni elektis interparoladon inter la „sovaĝulo” Makima, majstro en ironio, lia nepino Tela kun tiom beleta naiveco kaj la parizano Jakobo, katolika ateisto kaj bona franco el Francio).

— Ĉio tio estas tre afabla, sed tio ne malhelpas al vi min moki kaj ridindigi je mia malprofito.

— Nur je la malprofito de via dio.

— Je la malprofito de tio, kion mi devas ami kaj respektigi tute precipe..... Vi pli gravigas vian kulpon.

— Vidu, Jakobo, se vi dirus: „Du kaj du faras kvin”, ĉu mi devus, amikece al vi, klini la kapon kaj ŝajnigi kvazaŭ mi vin kredus?

— Mi ne scias.

— Kiel! Vi ne scias..... Sed mi havus tian malestiman indulgemon nur kontraŭ frenezulo! Sed mi al vi farus tiel la plej malbonan ofendon!

— Mi supozu, kaj poste?.....

— Mi ĝuas la rajton ridi pri la partaj frenezajoj de iu, kiu ne estas freneza. Se, marŝante, mi falas ne min dolorigante, vi ridos. Sed, se lamulo ekfalas, mi esperas, ke vi ne ridos.

— Ho, la plej lerte trovema el la sovaĝuloj, kion do pruvas ĉio, kion vi babiladas?

— Tio pruvas, ke mi devas ridi — kaj kiel cetere mi sukcesus min deteni? — kiam via kateĥismo asertas, ke estas tri personoj, el kiuj ĉiu estas dio, kaj kiuj tamen faras ununuran dion.

— Ne, vi ne devas ridi; vi devas revii respektate, ĉar oni al vi asertas, ke tio estas mistero.

— Vi volas min mistifiki, kun via mistero!..... Mi enmetos daktilon en unu el viaj poŝoj, kaj mi postulos, ke en ĝi estu tri. Se mi trovos nur unu, mi vin frapos. Kaj mi respondos al via miro kaj al viaj plendoj: „Mia filo, tio estas mistero”.

— Vi diras stultaĵojn, Makima.

— Mi estas feliĉa diri stultaĵojn, mia infano. Mi estas feliĉa, ke en via lando oni neniam frapis, nek buĉis iun pro religiaj demandoj. Mi estas feliĉa, ke la vortoj „persekutado”, „religia milito”, „inkvizicio”, „religia punbruligo”, „ekzekutisto”, „martiro” estas tiom sensignifaj, kiom viaj misteroj mem.

Mi ekleviis la ŝultrojn kaj havis superan rideton.

— Vi memorigas aferojn tiom malnovajn, mia kompatinda Makima! La hodiaŭaj malvulgaraj homoj ne plu interparolas pri tiuj fimalnovaj. Tie fiksante vian spiriton, vi fariĝas samrangulo kiel la plej maldelikataj kaj kiel la plej malkleraj.

— Vidante tion, kion oni al vi instruas,

mi konjektetas, ke la plej malkleraj el viaj samlandanoj eble ja estas la malplej frenezaj..... Vi aspektas al mi rajti ilin malestimati, proksimume kiel la ĉinino kun la torturitaj kaj deformitaj piedoj rajtas malestimati, la virinon, kies membroj restis normaj.

— Ĉu vi scias, Makima, ke se vi loĝus en Eŭropo, oni vin internigus en frenezulejo?

— Ĉu vi ja estas certa, ke via tuta Eŭropo kaj Azio kun ĝi kaj Afriko, Ameriko kaj Oceanio plie, ne konsistigas vastan frenezulejon?.....

— Kaj vi diras, ke vi amas ĉiujn homojn!..... Malfermu la okulojn, Makima, kaj konfesu ke vi malestimas ĉion, kio ne estas atlantida.

— Ĉar mi amas ĉiujn homojn, mi malamas ĉe ĉiuj tion, kio malformas kaj malpli grandigas ilian homecon. Mi malamas la malverajn kaj netoleremajn ideojn, patrioj de la malbonaj sentoj.

Estis longa silento. Kaj la malgranda Tela min demandis:

— Serioze, vi kredas ke virgulino, Jakobo, havis filon?

Mi ekbalancis malĝojigite la kapon:

— Stranga demando en la buŝo de dekdu-jara filineto!.....

Sed Makima:

— Viaj infanoj lernas la kateĥismon multe pli malfrue, sendube?

— Niaj infanoj lernas la kateĥismon tute junaj. Sed ili nenion komprenas el tio, kion ili recitas.

— Admirinda metodo de instruado!.....

Iuj atlantanoj amuziĝas bredante papagojn. Ĉu necesas ilin sendi instrui en viaj grandaj seminarioj kaj en viaj instruistaj institutoj?

— Vi estas tiel netoleremaj!.....

— Kion do vi nomas toleremo, vi?.....

Ni faras neniun malbonon al tiuj, kiuj proklamas la plej sensencajn ideojn. Sed amike, sen perforto, ni ilin admonas pripensi. Ĉu niaj kuracistoj estas netoleremaj ĉar ilia amo al la februlo iras ĝis voli forpeli la febron? Sed ili kontentiĝas konsili, kaj ili ne donas la kininon perforte. Tio pli malbone por tiu, kiu intermiksante sian malsanon kaj sian korpon, sian eraron kaj sian spiriton, koleriĝas, kiam oni al li indikas la rimedon!

Mi elektis definitivan decidon: — Kuraga? Malkuraga? Mi ne scias.

— Efektive, estas indiferente al mi, ke vi moke konsideru tiun malnovan religion. Mi ne kredas je ĝi. Sed mi respektas tiujn, kiuj al ĝi kredas.

— Ni respektas ĉiujn. Ni bruligas neniun, kaj ni ridas pri tio, kio estas mokinda.

— He! Lasu min trankvila. Vi estas maljusteco mem. La religioj estas absurdaj tiom unuj, kiom aliaj, kaj se mi konus la vian, mi ridus kun tiom da pravo, kiom vi ridas.

— Ni havas neniun religion.

— Neniu religio! Sed estas abomeninde! Kio al vi ordonas vin ami unuj la aliajn?

— Vi bezonas, ke oni al vi ordonu vin ami? ekmiris la malgranda Tela.

Kaj, en rido tiom moka kaj samtempe tiom plaĉe mola, ŝi demandis:

ESPERO KAJ TIMO

... Mia koro estas kun vi.

Mia okulo ne satiĝas rigardi vian flaman-tan standardon; mia orelo ne laciĝas aŭdante vian fortegan kantadon.

Mia koro estas kun vi. Sata devas esti la homo k luma devas esti en lia interno. Kaj libera li devas esti k decidi pri si, — pri si k pri sia laboro.

Kaj se vi murdas la pugnon, kiu volas vian liberan parolon, vian bruligan proteston repuŝi al la gorĝo, por ke oni ne aŭdu ĝin — ĝojas mi, mi preĝas al la dio, ke li akriĝu viajn dentojn. Kaj kiam vi marŝadas al la malnova Sodomo k volas ĝin detrui, mia animo estas kun vi, k la certeco, ke vi devas venki, ebruiĝas min kiel malnova vino.....

Kaj tamen mi timas vin.

Mi timas la subpremitojn, kiuj venkas: oni povas iĝi trudantoj, k trudantoj pekas kontraŭ la homa spirito.

Ĉu oni ne diras inter vi, ke la homaro devas marŝadi kiel armeo en la fronto, k vi ludos al ili la marŝmelodion sur la vojoj? kaj tamen la homaro ne estas armeo; pli fortaj iras antaŭen, pli emociemaj sentas profunde, fieraj kreskas supre — ĉu vi ne forhakos la cedrojn, por ke ili ne superkresku la herbon?

Ĉu vi ne disetendos viajn flugilojn super la mezgradejo? Ĉu vi ne kirasos la indiferenton k ŝirmos nur la grizan egalton-ditan hordon?

Mi timas vin.

Kiel venkantoj vi povas iĝi la burokra-tio, dispartigadi al ĉiu lian laboron kiel lecionojn en la deviglaborejo, k vi forigos la kreanton de novaj mondoj — la liberan homan volon k sufokos la plej puran fonton de homa feliĉo — la homan iniciatadon — la forton, kiu kontraŭas la individuon inter miloj, popoloj k generacioj, k vi mekanikigos la vivon k ordonos neniigi ĝin en kazernoj. Kaj vi estos okupata pri reguligado; pri skribado, notado, taksado k ordonado, kiel laŭte k kiel ofte rajtas bati la homa pulso, ĝis kiu distanco rajtas vidi la homa okulo, kiom multe utilas aŭdi por lia orelo, k kiajn sonĝojn rajtas havi sopiranta koro.

Kun kora ĝojo mi rigardas, kiel vi de ŝiradas la murojn de malnova Sodomo, sed mia koro tremas ĉe la penso, ke vi sur ĝia rubamaso konstruos pli malbonan — pli malvarman — pli malamikan!.....

Dolorkriado nenian oreton atingos, la homa spirito, kun forŝiritaj flugiloj staros ĉe la trogo kune kun la bovino k kun la bovo.

Kaj la justeco, kiu vin akompanis sur la dorna k sanga vojo al la venko, vin for-lasos. Kaj vi tion ne rimarkos; por tio estas venkintoj k blindaj regantoj, k vi

— Ĉu vi ankaŭ bezonas, ke via religio al vi ordonu manĝi, kiam vi malsatas?

Han Riner. „La Pacemuloj”
(paĝoj 96 ĝis 101 de l'originalo).
Tradukis Andreo Gay (21428).

Noto de la tradukinto. Tiuj paĝoj estis elektitaj de Manuelo Devaldes por sia Rintera antologio titolita „La Malbelaĵoj de la Religio” (eldonejo l'Idée Libre, HERBLAY, S. & O., Francio).

*) Han Riner, franca aŭtoro (1861-1938), ne nur aprobis, sed eĉ ellernis esperanton. Li rilatis koresponde kun k-do Lanti.

Dezirata korespondencoj

Principe individuaj korespond-anoncetoj kun ĝenerala enhavo estu adresataj al k-do H. Schrimpf, Oberschlesische Str. 15/0, München 61 (SAT-Koresponda Servo), kun 2 resp. kuponoj. Simplaj anoncetoj en S-ulo kostas 60 cendojn (2 resp. kup.). Aldonoj pri preferoj duobligas la koston. Pago per kuponoj (sed ne per stampitaj aŭ nestampitaj PM) al k-do C. v. Essen, Rotterdam, aŭ al SAT-parizo (se tio ne eblas pagu al via landa peranto).

— Usona 70-jarulo, SAT-ano n-o 1.087 pensiita planas enmigri iun landon de Suda (aŭ Centra) Ameriko k preferus logi konstante kun esp-isto, kiu uzas esperanton kiel hejmlingvon. Interesatoj skribu al *Johano Esperanto*, 2 Nichols Ave., Shelton, Conn., Usono.

— El ĉiuj landoj skribu amase, prefere ilustr. poŝtkartojn, al nia *Letervespero* okazanta la 17.3. La 30 unuaj skribintoj ricevos belan memoraĵon pri nia provinco. Grupo **LIBERO-LABORO**, ĉe K-do C. Martin, 33 rue Duhamel, Rennes (I. et V.), Francio.

— Esperantaĵojn kolektanta intern. klubo EKIK alvokas ĉiujn esp. kolektantojn aliĝi al EKIK; bezonas informojn por projektata katalogo de esp. glumarkoj, kovertoj, PK, gaz., bezonas donace ekzemplerojn kun informo pri eldonkvanto; — kongreskovertojn, PK-ojn kun speciala kongresa poŝta stampo. Respondas per usonaj k UNO-bildkovertoj. O.K.K. oj uzu por specialstampoj poŝtaj normforman koverton (usona 1-taga bild koverto, plej efika por ekspozicio k albumo). Kongresanoj afraŭku bildflanke. Korespond-adreso: L. Obreczian, 213, 1/2, Sixth St., Windber, Penna, Usono.

(daŭrigo sur paĝo 7)

falos en maljustecon k vi ne sentos la marĉon sub viaj piedoj..... solide sentas sin ĉiu reganto, tiel longe kiam li ne falis.....

Kaj malliberejojn vi konstruos por tiuj, kiuj levos la manojn por montri al vi la abismon en kiun vi estas subiĝonta..... Kaj vi ŝiros el la buŝoj la langojn, avertantaj vin pri la sekvantoj, kiuj detruos vin k vian maljustecon.....

Kruele vi defendos la t. n. rajton de la homsfarado al la herbo sub ĝiaj piedoj, k viaj malamikoj estos: liberaj individuoj, geniaj eltrovintoj, profetoj, liberigantaj poetoj k artistoj.....

Cio, kio okazas, okazas en sia tempo... la tempo estas ŝanĝo, ĝi evoluas; ĝi estas la eterna elburĝoniĝo, ekflorado — la eterna estonto.....

Kaj se via estonto, al kiu vi strēbas, similos la nuntempon, vi estos defendantoj de la pasinto, de la jam mortinta k de la morto, vi piedfrapos la burĝonon de la estonto k vi verŝados riverojn da malvarma akvo sur la noblulojn, de l'profeteco, revado k novaj esperoj.

Morti ne volas la hodiaŭa tago, sange subiras ĉiu suno.....

Mi deziras vian venkon, mi esperas je ĝi, sed mi ektimas k tremas pro via venko.

Vi estas mia espero, vi estas mia timo...

I. L. Perec. El la juda esperantigis Petro.

Ci tiu skribaĵo estis verkita en la jaro 1906 en Polio (kiu ankaŭ tiam estis sub rusa regado). Dum tiuj jaroj Lenin k liaj kamaradoj de la bolŝevika partio komencis disvastigadi siajn ideojn. — Trad.

Memornoto

La franca pedagogia movado „Presarto en Lernejo”, kies iniciatinto estas la pedagogo Freinet, organizas Sumeran Lernejon, dum ferio, de la 11.—25. julio apud Parizo (en liceo de *Versajlo*). Oni ne nur diskutos pri ĝeneralaj temoj, sed ankaŭ inicos la instruistojn pri la metodo. Partopreno de esperantistoj (el inter ili la orgnizanto mem) ebligas al ĉiuj profiti plene la restadon. Skribu al: *Lallemand*, instruisto, *Givet par Flohimont*, Ardennes, Francio.

N. B. Havkin, sekretario de Zamenhof-Fondo, P.K. 804, Jeruzalemo, ĵus festis sian 80-an naskiĝtagon, sana k laborkapabla, intencanta reeldoni la esp. revuon „Vegetarano”, kiu aperis ĉiumonate en la jaroj 1914—1937. Vegetarano rilatu kun li pri tiu afero! Naskita en Blankrusio, Havkin iris Moskvon en 1891 por lerni juvelist-metion. Ekde 1897 li lernis en grafik-lernejo munkena k fondis k gvidis grafik-an instituton tie ĝis sia translokiĝo Jeruzalemon, en 1921.

En la kalendaro de SIA (Solidaro Internacia Antifaŝista) por 1954 troviĝas plenpaĝa artikolo de k-do Gijemo favore al esp-o kun mencio de SAT.

Mark Starr varbas por esperanto en „Today's Speech”, okt. 1953; tiu longa artikolo aperis kiel aparta flugfolio.

Membro-Movado

Forstrekulo en la Jarlibro jenajn lokojn: Carignan, Ivry-Bataille, Surry Hills, Waterman.

Aldonu jenajn: Alingsås, Svedio: Andersson A., Kalleid, Vadsjón Baerum, Norvegio: K-ino L. Bøe, Langoddeveien 69, Snarøya; Boka, Banat, Jugosl.: Iljevic St.; Bischwiller, B. Rhin, Francio: Kiehl Fr. Ph., prof., 20 rue de l'Eglise; Port Moresby, Nov.-Gvineo: K. Hunold, c/o Hornibrooks Constructions; Rions, Gironde, Francio: Sicut J. P.; Romans s/Isère, Drôme, Francio: Bourdonneau P., 3 rue V. Boiron; St. Aquilin-Pacy, Eure, Francio: Chervel G., 64 rue; M. Moisson; St. Gervaise-des-Bois, S.O., Francio: Dessens J., 87 av. G-al Leclerc; Sarreguemines, Moselle, Francio: F. Boyet, 23 rue Fulrade; Tripoli, Libio: Eusebione Eus., prof., 3 Sciarra Istanbul (Vill. Alberta); Windber, Penns., Usono: Obreczian L., 213, 1/2, Sixth St.

Por ke SAT venku la Krizon!

Kun danko ni kvitancas jenajn donacojn: — en Parizo: (ff.) A) Ledon 270, Lévy 270, Doit 100, Orlange 40, Grandiere 270, Stephan 90, Krippner 270, Dalmay 250, Cuny 220, ge-Chabrière 120, Rival 270, Rambaldi 370, Vigier 50, Dazun 350, Martin-Lille 100, Bulkur 270, Avid 270, Delatol 220, Rémy 270, Pérez Rubio 100, Damarin 270, Miketo 270 (sume: ff. 4.710, kun antaŭaj listoj: sff. 105.735); B) Barta, Denver, 2 dol.us.

— en Roterdamo: (guld.) K-ino Brandsma-v. Leeuwen 26.30 (kun antaŭaj: gd. 499.38)

— en Stokholmo: (s.kr.) Geist 30 (kun antaŭaj: skr. 1.129.55).

Sennacieca Vojaĝo-Servo por Gejunuloj

Petu la regularon k proponilojn de via landa respondeculo aŭ rekte de la Centro: P. Louis, 96 rue de Nabécor, NANCY, Francio.

Por Britio: K-ino Prent, 27 Argyle Rd., Ilford, Essex.

Por Danio: K-do Magnus Jacobsen, Rydersvej 9, Aarhus.

Por Germanio: K-do Ed. Hertlein, Auenstr. 78, III, München 13.

Por Nederlando: K-do H. J. Beijne, v. Boetzel-laerstr. 58, Amsterdam.

Por Svedio: K-do Y. Nilsson, Förvaltarvägen 20, Enskede.

Recenzoj

Liu Bejü: *Fajrolumo en la Fronto*. Elĉinigi S. J. Sü. Eld. Sanhaja Esperantista Ligo, P.O. Kesto 636, Sanhajo. 148 p. Form. 14 × 19 cm. Prezo: 1 dol.

La titolvorto estas uzita materie k metafore: fajrolumo de l'eksploziantaj artileriaĵoj k tiu de triumfo. Mi estas tro naŭzita per la partopreno en du militoj, por ĝui la epizodojn de tiu freŝa atakmilito, kvankam temas pri „sankta popola liberiga batalo”, kies historian neceson k logikecon mi ne kontestas. — La lingvo estas ĝenerale bona, simpla, neologismoj evititaj. Mi kritikis la malĝustan uzon de „lerni” (anglasence) anst. „ekscii” (p. 28) k „skoltanto” anst. „skolto” (p. 107). Klara preso.

Lu Sin: *Sovaĝa Herbaro*. Elĉinigi S. J. Sü. Sama eldonejo. Form. 14 × 19 cm. 65 p. Prezo 0.50 dol.

24 mallongaj skizoj facile legeblaj; kelkaj el ili (ekz. *Kajto*) vekas emociion. La aŭtoro en Ĉinio estas sufiĉe fama. Kial la vorto „abandoni” (forlasi) sur p. 1 de la libro?

Triesto... Al kiu? Eldonis Slovenia Esp. Ligo, Ljubljana, Mikločičeva 7, I. 48 paĝoj plus mapo. Formato 13,5 × 20 cm. Havebla por 1 resp. kuponon (afranko).

Jen esperanto metita je la servo de naciaj aspiroj! La Triesta problemo, aktuala politika problemo, prezentita el jugoslava vidpunkto (teksto disponigita al P. Zlatnar de la Instituto por Demandoj pri nacieco ĉe universitato en Ljubljana). Memorigas nin tiaspeca broŝuro pri la esperantista interveno — per broŝuroj — en la unua mondmilito: i.a. en Germanio k Francio aperis tiaj propagandiloj parte ŝtate subtenitaj.

NIA POŬTO

Al kelkaj. — Ni ne akceptas nemenditajn librojn, pro kiuj la dogano postulas monon de ni. Eldonistoj antaŭe interkonsentu kun ni! El nepropraj eldonaĵoj ni vendas nur tiujn, kiuj okaze de la recenzo en „S-ulo” portas la noton „havebla ĉe SAT”, aŭ kiuj estas notitaj en nia katalogo (jarlibro) aŭ anoncitaj speciale en „S-ulo”.

Al iuj aktivuloj en popoldem. landoj. — Dankon pro viaj afablaj salutoj k bondeziroj esprimitaj al ni okaze de la jarŝanĝo!

Radio-Infoj

Radio Romo dissendas ĉiumerkrede (prelegas L. Minnaja) k ĉiuvendrede (prelegas d-ro V. Musella) je 18.50—19.10 h. (MET), stacioj m. 31.35 k 49.92. (Korespondadojn oni adresu al Radio ROMA, Cas. postale 320, aldonante nenium fakon aŭ nomon).

— Mi atendas senpacience la novan kajeron de

SENNACIECA REVUO

— Estu trankvila! Tiu 60-paĝa eldono aperos komence de marto kaj respondos al viaj deziroj.

Leginda verko:

HISTORIO DE SAT 1921-1952

Bela volumo de 152 paĝoj en formato 14 × 20 cm. Ilustrita.

Prezo: 1.30 dolaro.

Tiu ĉi eldono de SAT donas al novaj kaj malnovaj membroj riĉan provizon da dokumentoj. Instrua por la novuloj, memoriga por la „veteranoj”.

Ĉe SAT kaj la LEA-Libroservoj.